

BONA OKAZO STUDI KAJ PROGRESI

La Jagelona Universitato (Pollando) invitas E-parolantojn al 5-monata kurso de Esperanto gvidota de instruistino vive, en Interreto. La lernado daŭros de la 8-a de februaro ĝis la 25-a de junio 2017. Instruas Maria Majerczak.

La oficialaj konfirmiloj pri la partopreno enhavos aldone la markon de la internacia EAQUALS-kvalito de Esperanto-instruado en JU, kio plialtigos ilian internacian prestiĝon.

Se inter viaj novjaraj decidoj estas plibonigi vian lingvoscion, jen eblo fari tion. Ĉi-foje estas proponata i.a. horo vespera (Eŭropo kaj Afriko) aŭ posttagmeza (Ameriko).

Limdato por aliĝi: **6 februaro 2017**

Informoj: goo.gl/x1S3AH

Se, studinte ĉiujn informojn en la indikita retpaĝo (la anonco), vi decidis ALIĜI, bv. skribi al: [esperanto.instruado.jag.univ.pl\(at\)gmail\(punkto\)com](mailto:esperanto.instruado.jag.univ.pl(at)gmail(punkto)com) (ni publikigas la adreson de la kursoj ĉiam en tiu kontraŭ-spama formo).

Kore salutas vin

Maria Majerczak